

Komponisto Ivan Acher

La 29-an de majo 2017 Max Kašparů transsendis al mi retmesaĝon de Ivan Acher, en kiu li petas, ĉu iu povus esperantigi por li parton de nova opero **Suferado de princo Sternenhoch**, kiun li komponas por Nacia Teatro en Prago. Mi legis antaŭ multaj jaroj la novelon de Ladislav Klíma pri Sternenhoch kaj restis en mi ion naŭza impresio. Mi demandis nur la muzikeman Pavla Dvořáková pri ŝia opinio, ankaŭ ŝi skribis, ke la verko postlasis en ŝi malagrablajn sentojn kaj ke ŝi timas, ĉu iu ne volas ridindigi Esperanton. Tion mi ne kredis, sed prefere mi ne plu menciis antaŭ esperantistoj,



ke mi esperantigas tian strangaĵon. Cetero mi pensis, ke temos nur pri kelkaj frazoj kaj mi volis pruvi, ke Esperanto kapablas traduki kaj esprimi ĉion.

S-ro Acher poste sendadis al mi neregule unuopajn scenojn, en kiuj li indikis per dikaj literojn, kiujn konkretajn frazojn li deziras esperantigi. Ne estis versoj, do mi povis ilin traduki proze. Mi demandis lin, kian sencan havos kantoj, kiujn la publiko ne komprenos, kaj li respondis, ke li volas, ke la spektantoj aŭskultu la melodion kaj ne klopodu deĉifri la vortojn. Tial li elektis lingvon, kiu similas al la itala, sed ne estas la itala. Li eĉ sendis al mi son-specimenon de sopranino, en kiu mi miris, kiel bele oni kantas, sed ankaŭ mi preskaŭ ne komprenis.

Mi devas konfesi, ke tiam la nomo Ivan Acher diris al mi nenion kaj eĉ ne venis en mian kapon ideo serĉi lin per Guglo, kio min nun surprizas, ĉar diversajn aferojn mi guglas preskaŭ ĉiutage.

La 17-an de marto 2018 li invitis min al premiero en Nova Scenejo de Nacia Teatro en Praha, kiu poste okazis la 7-an de aprilo 2018. Mi decidis, ke mi veturos al Prago kaj nur post la spektaklo, kiam mi vidos la rezulton, mi eble konfesos al la esperantistaro, kion mi faris. Sinjoro Acher sendis al mi ankoraŭ la tutan tekston por fari la lastajn korektojn antaŭ presado. Mi miris, kiom da mistajpoj mi lasis en la teksto kaj atentigis pri ili per ruĝa koloro.

La 28-an de marto venis ret-mesaĝo de Miroslav Hruška adresita al la asocia komitato, ke li trovis en la programo de Nacia Teatro, ke oni prezentos novan operon en Esperanto kaj ĉu iu scias pri tio? Do mi konfesis mian esperantigon (en la retejo de Nacia Teatro mankis mia nomo). Leonka Chaloupková tuj reagis, ke ŝi aĉetis bileton kaj ankaŭ ŝi vizitos la operon. Iu atentigis min pri Esperanto-televido, kie aperis intervjuo kun la reĝisoro Michal Dočekal pri la nova opero kun esperantlingvaj subtekstoj. Mi poste konstatis, ke la video estis prenita el Youtube, sed kiu faris la subtekstojn, mi ne scias ĝis nun.

Ivan Acher skribis al mi, ke je la 18,30 h mi atendu lin ĉe la kaso, ke li alportos al mi bileton, ĉar estas jam komplete ĉio disvendita, kvazaŭ temas pri koncerto de Beatles. Mi do alveturis al Prago la 7-an de aprilo, iomete promenis tra la stratoj kaj sur la Slava Insulo, poste mi iris al la kaso kaj eksidis sur seĝon sub la ŝtuparo. Subite eksonoris mia poŝtelefono kaj s-ro Acher diris al mi, ke ili ankoraŭ lastmomente ekzercas kaj ĉu mi jam venis. Mi jesis kaj li kuris malsupren, donis al mi la bileton kaj invitis al bufedo en la unua etaĝo. Mi respondis, ke mi ankoraŭ atendas mian koleginon el nia asocio, poste ni venos ambaŭ. Li do denove kuris supren por daŭrigi la ekzercadon.

Kiam aperis Leonka, ni iris ambaŭ supren al la bufedo. Tie jam staris la komponisto kun la reĝisoro ĉe la vendotablo kaj ion trinkis. Mi prezentis Leonkan kiel nian vicprezidantinnon, Ivan Acher prezentis sinjoron Dočekal kiel reĝisoron. Li proponis al ni trinkaĵojn, ni iomete babilis, sed poste venadis aliaj homoj, kiuj volis kun ili paroli, do ni iomete retiriĝis.

Leonka havis bileton en la unua vico, maldekstre de la orkestro, mi en la deknua vico en la meza parto de la spektejo. Mi estis agrable surprizita, kiel bele Esperanto sonas en la teatro kaj

verŝajne ni du estis solaj, kiuj komprenis. La ceteraj povis legi super la scenejo ekranon kun tradukoj en la ĉeĥa kaj angla. Mi provis rezigni pri la komprenado kaj ĝui nur la muzikon kiel la cetera publiko, sed ne eblis. Aŭdinte konatajn vortojn mi tuj komencis koncentriĝi pri la enhavo de la paroloj, mi eĉ fermis la okulojn, por ke mia koncentriĝo estu pli forta. Tiam mi vidis, ke sinjoro Acher pravas: kiam la spektantoj komprenas la lingvon, ili ĉesas aŭskulti la melodion kaj klopodas deĉifri la unuopajn vortojn. Pleje al mi plaĉis la koloraturo de Helga (kantistino Vanda Šípová), kiu estis la sola, kiun mi ne komprenis kaj mi vere aŭskultis nur ŝian belan voĉon. Ĉe la ceteraj mi jam komprenis kaj pli atentis, kion ili kantas ol kiel ili kantas.

La fina aplaŭdo estis longa kaj poste en la vestiblo okazis malgranda prezento de la artistoj fare de la direktoro de la teatro. Kiam li alvokis sinjoron Acher, tiu prenis min je la kubuto kaj altiris al la mikrofono. Li diris, ke mi estas tiu, kiu esperantigis la operon, donis al mi la mikrofonon kaj petis min, ke mi traduku al Esperanto, ke "Nacia Teatro pli zorgu pri la artistoj ol pri la oficistoj". Leonka nin fotis per poŝtelefono kaj ankoraŭ elpetis de profesia fotistino, ke ŝi sendu al ni profesiajn fotojn kun permeso uzi ilin en Starto. Ŝi ankaŭ aĉetis la programojn, en kiu estas presita mia traduko (mi donacis ĝin al nia kluba biblioteko).

Mia trajno forveturis el Prago noktomeze kaj je la 4-a matene mi jam estis en mia lito. Sed per tio la afero ne finiĝis.

Poetino Věra Ludíková skribis al mi, ke ŝi vespere aŭdis en televido intervjuon kun s-ro Acher kaj ke li laŭdis min. Mi trovis la elsendon en la reto kaj tiel mi eksciis, ke sinjoro Acher komponis muzikon por pli ol 150 teatraĵoj kaj filmoj, nur la opero estis lia unua. Do nur nun mi ekkomprenis, ke Ivan Acher estas muzika gravulo kaj komencis interesiĝi pri lia vivo kaj verkaro.

Mi eksciis, ke li naskiĝis en la jaro 1973 kiel Ivo Šrajer, post gimnazio iris al Teknika Universitato en Liberec, kie li studis tekstilian dezajnon. Sed li certan tempon laboris ankaŭ kiel arbaristo kaj lignaĵisto kaj komencis fabriki proprajn, ofte tute novajn muzikilojn. La muzikon li studis aŭtodidakte, tial li ne estas ŝarĝita de lernejoj ŝablonoj. Male, li eĉ fondis organizon por reamatorigi la profesiajn muzikistojn. Li ankaŭ verkas aŭ adaptas tekstojn kaj mem ilin muzikigas. Kunlaboras kun muzikgrupoj NUO kaj Agon orchestra kaj komponas por multaj teatroj en Ĉeĥio kaj ankaŭ eksterlande kaj por filmoj artismaj kaj dokumentaj. Plurfoje li estis honorigita, ekz. premion Ĉeĥa Leono li ricevis pro muziko al filmo **Odpad město smrt** (*Rubo urbo morto*). Plie li muzikigis dokumentajn filmojn **Včely letěly krásně** (Abeloj flugis bele), **Vězení umění** (Malliberejo de arto), **Cesta vzhůru** (La vojo supren) kaj **Tajemství Divadla Sklep aneb manuál pro záchranu světa** (Sekreto de la Teatro Kelo alivorte Manlibro kiel savi la mondon), artismajn fimojn **Zakázané uvolnění** (Malpermesita liberigo) kaj televidan serion **Škoda lásky** (Domaĝe pri la amo).

Por la Nacia Teatro Brno li komponis muzikon al spektakloj **Běsi** (Demonoj), **Hvězda stříbrného plátna** (Stelo de la arĝenta ekrano), **Kámen a bolest** (Ŝtono kaj doloro), **Kdyby, tak, a copak** (Se tamen, do kion), **Loupežníci** (Rabistoj), **Růže pro Markétu** (Rozoj por Margareta), **Vévodkyně kaj kuchařka** (Ĉefdukino kaj kuiristino). Por Hadivadlo **Idioti** (Idiotoj) kaj **Ing. Hlaváček** (Inĝeniero Hlaváček), **Česká měna** (Ĉeĥa valuto), **iPlay**.

Li komponis ankaŭ por aliaj teatroj, ekz. Divadlo Komédie, Divadlo Archa, Divadlo na Zábřadlí, Divadlo nablízko (ĉiuj Praha), Divadlo F.X. Šaldy, Naivní divadlo (ambaŭ Liberec), Činnoherní studio (Ústí nad Labem). El famaj teatraĵoj temis ekz. pri **Proceso** de Kafka, **Vizito de maljuna damo** de Dürrenmat, **Kapitano Nemo** de Verne, sed plej multaj estis novaj modernaj verkoj: *Ostrostřelci*, *Kvartet*, *Antiklimax*, *Sportstück*, *Vyšetřování pokračuje*, *Nosferatu*, *Snílci*, *Spiknutí*, *Lvíče*, *Zajatci*. *Gäste*, *Lulu*, *Touhy a výčitky*, *Srdce temnoty*, *Hodina*, ve které jsme o osbě nevěděli (Divadlo komedie), *Danse Macabre*, *V 11.20 tě opouštím*, *Divnej soused*, *Lola & Mr. Talk*, *Holdin Fast*, *Adaptact* (Divadlo Archa), *Sarah Kane*, *Camouflafe*, *Píšu z Pekla*, *Ūl* (Národní divadlo Praha), *Nám můžete věřit*, *Česká pornografie*, *Asanace*, *Přítelkyně osamělých srdcí* (Divadlo Na Zábřadlí, Praha), *Arabská noc*, *Jméno*, *PushUp*, *Tvář v ohni*, *Na arše* (Divadlo F.X.Šaldy, Liberec), *Pohádka o Řaškovi*, *Krüss* (Naivní Divadlo Liberec), *Faidra*, *Malá čarodějnice*, *Soukromá vichřice* (Činnoherní studio, Ústí n.L.), *Tvář v ohni*, *S vyloučením veřejnosti* (Divadlo Nablízko), *Parazit*

(Meat Factory Praha).

Plie li komponis por: Alfa Plzeň, Karlovy Vary, Uherské Hradiště, Polárka Brno, Pídivadlo Praha, studio Fabrika, 4dny v pohybu, Divadelní Loď Tajemství bří Formanů kaj Český rozhlas.

foto: Leonarda Chaloupková